

# Nagasaki kaj la 97-a Japana Kongreso

## Venu al la 97-a Japana Esperanto-Kongreso en Nagasaki!

En 1902 Alphonse MISTLER, kiu venis el Francio al Nagasaki, prezentis Esperanton unuafoje en Japanio. Se li ne farus ĝin, la japana Esperanto-movado ŝanĝiĝus kompare kun la ĝisnuna historio; nia movado eble pli malfrue disvolviĝus. Tial ni japanaj esperantistoj devas danki lin. Ja, Nagasaki estas la patrino urbo de japanaj esperantistoj.

Kaj la urbo Nagasaki estis konstruita sub la influo de eŭropaj kristanoj en la 16-a jarcento. Tial multaj japanaj kaj eŭropaj kristanoj loĝis en Nagasaki. Sed en la epoko Edo (1603-1868) kredo je kristanismo estis malpermesata. Sed multaj kristanoj en Nagasaki ne forĵetis sian kredon. Tial kristanoj estis persekutataj de la reganto. En 1873, kiam la kredo de kristanismo estis denove permesata post longa malpermesado, multaj sin kaŝintaj kristanoj reaperis. Tial multaj kristanaj preĝejoj troviĝas en

moderna medicino, estis enkondukitaj tra Dezima. Kaj multaj japanaj junaj eminentuloj, inkluzive de SAKAMOTO Ryōma (1836-1867), venis al Nagasaki por gajni novajn informojn pri la mondo en la epoko Edo. Do, tial Nagasaki estas ja historia urbo.

Kaj en Nagasaki troviĝas multaj bongustaj manĝaĵoj: ‘Ĉanpon’ (nudelo), ‘Ŝippoku’ (luksa manĝaĵo por regali), ‘Kastera’ (spongo-kuko), kaj aliaj. Kiam vi venos al Nagasaki, vi povos manĝi ilin.

La temo de la kongreso estas “Esperanto ŝanĝas la mondon, ankaŭ vin!”

Do, vi venu al Nagasaki, kaj vi ŝanĝu vin al bela kaj vigla esperantisto per Esperanto!

Japanaj esperantistoj, bonvolu veni al via patrino urbo Nagasaki kaj ĝuu Nagasakon!

Koreaj esperantistoj, bonvolu veni al Nagasaki por la venonta Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en 2011, kaj ĝuu Nagasakon!

Aliaj tutmondaj esperantistoj, bonvolu veni al bela, paca, internacia kaj interesa urbo Nagasaki kaj ĝuu Nagasakon!

Ni bonvenigos vin!

Do, bonvolu vidi la hejmpaĝon de la 97-a Japana Esperanto-Kongreso (<http://esperanto.jp/jek10n/>) por ekscii pli multe pri la kongreso!



poŝtmarko kun desegnaĵo  
de Dezima

Nur nederlandanoj kaj ĉinoj estis permesataj por komerci kun japanoj. Novaj aferoj, kiel

Nagasaki.

Kaj ‘Dezima’, artefarita insuleto en Nagasaki troviĝis kiel nur unu fenestro al aliaj landoj en la epoko Edo.

Nur nederland-

Koran antaŭdankon !

(MORIWAKI Yasumasa)

(要約) 長崎は日本へエスぺラントを紹介したミスレルがいた町。日本のエスペラ

ンティストにとって「ふるさと」です。ぜひ長崎に来て、第 97 回日本大会に参加してください！  
(盛脇保昌)

## Pri Nagasako

### Pri la gubernio Nagasako

Ĉirkaŭ la gubernio Nagasako estas maro krom la loko apud la gubernio Saga en la oriento. En la gubernio estas multaj insuloj. Inter ili Tusima, Iki kaj Gotô estas iom grandaj insuloj. Troviĝas multaj malgrandaj insuloj. La nombro de la insuloj estas 971 (la plej multaj en Japanio; inter ili nepriloĝataj insuloj estas 898). En Nagasako nenie troviĝas loko kie estas pli ol 15 km fore de marbordo. Oni facile komprenas kiel multe da malgrandaj insuloj apartenas al la gubernio Nagasako. Do la longeco de la marborda linio de la gubernio estas 4203 km (en 2008). Hokkaido havas 2978 km da marborda linio escepte de la nordaj kvar insuloj. Kvankam la grandeco de Nagasako estas nur dudekono de Hokkaido, tamen ĝia marborda linio estas ja ĉirkaŭ 1.4 oble pli longa ol Hokkaido. Tio dependas de la granda nombro da insuloj kaj ankaŭ rias-marbordo (tre komplika kiel la marbordo de Ría en Hispanio).


La supozata loĝantaro estas 1 431 000 (en feb. 2010). La problemo estas, ke la

loĝantoj en malproksimaj insuloj duoniĝis dum lastaj 40 jaroj. Ĉar 90% da junuloj kiuj finis lernadon en altlernejoj en insuloj foriris al urbaj distriktoj por havi laborojn.

En la gubernio estas varme, ĉar la varma marfluo enfluas de la sud-okcidento. Do diferenco inter varmo kaj malvarmo estas malgranda.

Ŝipkonstruado, fiŝkaptado kaj turismo estas tri grandaj industrioj en Nagasako.

La ŝipkonstrua industrio en Nagasako evoluis ĉirkaŭ la bona haveno de Nagasako. La Ŝipkonstruejo de Mitsubishi kaj aliaj mezaj kaj malgrandaj ŝip-




la gubernio Nagasako

farejoj sin trovas en la urbo Nagasako kaj ĝiaj antaŭurboj.

La marindustrio estas la due granda en Japanio. Ĉar por tio Nagasako estas favora pro multaj insuloj kaj golfetoj kaj varma marfluo de Tusima.

En Nagasako sin trovas multaj karakterizaj festoj, kulturaj instalaĵoj kaj historiaj heredaĵoj. Do multaj turistoj vizitas Nagasakon. Jen estas turismaj lokoj:



Katedralo de Ōura

La Ĝardeno de Glover, ĉinaj temploj, Katedralo de Ōura, Katedralo de Urakami, Ponto de Okulvitroj, Kastelo de Simabara ktp ktp.

Estas festivalo de la Sanktejo de Suwa en la urbo Nagasako ĉiujare en

9-11 de oktobro. Urbanoj de Nagasako nomas la festivalon “Okunĉi”, kiu signifas Tagojn por Sanktejo. Ĝi estas nomata ankaŭ unu el la tri grandaj festivaloj en Japanio.

Nagasako havis fenestron unu solan en Japanio, malfermatan al la mondo eĉ en la tempo de la sinizolado de Japanio. Do ĝi povis okupi originalan prosperon kaj specialan pozicion por ekonomio kaj kulturo. Kaj ĝi kreskis kiel komerca urbo kiu estis plena de ekzotikismo por japanoj.

La 17-an de novembro 1990, la Monto Fugen en Unzen (40 km oriente de la urbo Nagasako) erupciis. Poste okazis

kelkfojaj erupcioj. Vere 13 lafaj volbaĵoj estiĝis post la unua lafa volbaĵo aperinta en la 20-a de majo 1991. La plej alta volbaĵo estis nomata “Heisei-Sinzan” kiu signifas novan monton en la erao Heisei. Tiu nova monto estas 1483 metrojn alta, la plej alta montopinto en Nagasako. Tio estas memoro de nova reviviĝo kaj la katastrofo kiu daŭris dum ses jaroj. La Muzeo Memore al Katastrofo de la Monto Unzen estas vizitinda.

(FUKAHORI Yoshifumi)

(要約) 島嶼の数 (971, うち無人島 898) は全国一位。造船, 水産, 観光が三大産業である。日本三大祭の一つである長崎市諏訪神社のお祭り「くんち」の最終日が今回の長崎日本エスぺラント大会の初日あたる。雲仙普賢岳の噴火は記憶に新しい。

(深堀義文)

## Invito al la piediro “Saruku”

Ni rekomendas 2 turismojn el 52 piediroj “Saruku”. (“Saruku” signifas vagadon en la dialekto de Nagasako.)

### 1 La vojo Ryōma

Piediro N-ro 12: De la bushaltejo “Kazagasira (風頭)” al la templo “Kōei-zi (光永寺)” tra la vojo Ryōma (龍馬), kiu gvidas vin al Teramati, estas ĉirkaŭ 2 km (90 aŭ 150 minutoj por turismo) da vojo.

Oni povas vidi Mitsubishi-ŝipkonstruejon ĉe alia bordo kaj Havenon de Nagasako.

La vendejo de kajtoj “Ogawa”, kiu sin

trovas ĉe la enirejo de la parko “Kazagasira”, havas domon, kie materialoj pri kajtoj de Nagasako estas kolektitaj, kaj tie oni povas ĝui diversajn kajtojn de Nagasako.

Unue oni trovas la tombejon de UENO Hikoma (上野彦馬), kiu estas konata kiel la unua fotisto en Japanio. Apude troviĝas la statuo de SAKAMOTO Ryōma. Oni trovas ankaŭ la literaturan monumenton de *Iranta Ryōma* de la verkisto SIBA Ryōtarō.

En la vojo al “Kameyama-Syatyū” (亀山社中 Firmao de Kameyama), restas postsigno de la forno por “porcelanaĵoj de Kameyama (亀山焼)”, kaj la Memor-domo de la firmao, kaj la postsigno de la restoracio “Ryōrin-tei (良林亭)”, kie oni kuiris eŭropan kuiradon unuafoje en Japanio. Troviĝas ankaŭ la sanktejo “Wakamiya-Inari” kiu estas konata pri la “Take-n-Gei (竹ん芸)” (aŭ akrobatado sur longaj bambuoj).

La postsigno “Kameyama-Syatyū” estas konata la loko (vidu p.23) pro la unua kompania sistemo en Japanio. Tuj proksime vi trovas modelon de “Botoj de Ryōma”. De tie ankaŭ vi povas rigar-

di same kiel Ryōma panoramon de la haveno de Nagasako.

Vi alvenas al Teramati, kaj vi trovas multajn templojn ĉi tie. Multaj ŝtonaj pontoj en



Nagasako estis konstruitaj por iri al ĉiuj temploj.

Fine vi povas ekscii ĉe la templo “Kōeizi (光永寺)” ke FUKUZAWA Yukiti studis nederlandan sciencan tie ĉi dum unu jaro. Vi povas trovi ankaŭ la ponton “Megane-basi”, se vi paŝas ĉirkaŭ 5 minutojn malsupren al rivero.

## 2 La Vojo de Sinti al Ĝardeno de Glover

Piedirado N-roj 2 kaj 1: De Urba Hospitalo de Nagasako al Katedralo de Ōura, aŭ al Ĝardeno de Glover (グラバー園), tra kelkaj lernejoj en Higasi-Yamate kaj Konfucea Maŭzoleo (孔子廟), estas ĉirkaŭ 4 km (180 minutoj por turismi) da vojo.

Trairante tra Holanda-Saka (aŭ Nederlanda Deklivo オランダ坂) vi trovas la lernejon Kassui-Gakuen (活水学園), kaj ankaŭ estas la lernejo Kaisei-Gakuen (海星学園), kie laboris Mistler, kiu enkondukis Esperanton unuafoje al Japanio, kaj poste vi trovas Konfucean Maŭzoleon. Ĉe la vojo vi trovas nederlandan defluilon (オランダ溝), kiu estas triangula. Kaj tie vi povas ekscii ankaŭ diferencon inter franca kaj angla brikmuroj.

Konfucea Maŭzoleo estis konstruita de ĉinoj elmigrintaj en Japanion en 1893, kaj ĝi estas nur unu en Japanio. Se vi havas kelkan tempon, bonvolu eniri en ĝin.

Trairante la tramhaltejon Isibasi, vi trovas deklivan lifton, kiun la urbo Nagasako konstruis unuafoje en Japanio. Vi povas eniri en Ĝardenon de Glover,

uzante du liftojn deklivan kaj ortan.

“Rest-domo de Minami-yamate (南山手レストハウス)” estas ripozejo, kaj unu el plej malnovaj okcidenteskaj domoj en Nagasako. Tie ĉi estas ankaŭ la ekspoziciejo por la heredaĵoj de modernaj industrioj. La havena panoramo estas tre bona.

Poste, vi malsupreniras la deklivan vojon “Kinen-zaka”, kiu estis konstruita per ŝtonaj pavimoj antaŭ la jaro 1880, kaj vi trovas tri konstruaĵojn: budhisma templo “Myōkō-zi (妙行寺)”, ŝintoisma sanktejo “Ōura-Suwa-zinzya” kaj “Katedralo de Ōura”. Oni nomas tiun ĉi lokon “Triangula Zono por Preĝi”.

Katedralo de Ōura estas la plej malnova gotika konstruaĵo en Japanio. Vi povas vidi belan vitralon kaj viziti la ĉambron de kristanismo materialoj ĉi tie.

Vi povas vidi belan ĝardenon kaj ekscii kiel vivis familianoj de Glover en pasintaj tagoj en la Ĝardeno de Glover.



la domo de Glover

Aliaj kelkaj domoj kun materialoj kaj malgrandaj muzeoj troviĝas en tiu ĉi loko. Ne pretervidu ilin!

(KACUTA Kihei)

(要約) 52 もある長崎さるくコースのうち、厳選した「龍馬通り」と「新地からグラバー園への道」について紹介した。

(勝田基平)

## Nagasako kaj SAKAMOTO Ryōma

Ĉar Nagasako en la tempo de nacia sinizolado estis unika fenestro malfermata al Okcidento, diversaj eksterlandaj sciencoj kaj teknikoj envenis tra Nagasako. Tial multaj granduloj, kiuj poste kondukis Japanion al modernigo, vizitis la urbon por studo. Unu el ili estis SAKAMOTO Ryōma.

Ryōma havas eĉ nun nacian popularecon pro sia aktiva agado kiel ĉefa persono de la redono de la regpotenco al tennoo kaj sia tro libera karaktero.

En 1835, li naskiĝis kiel la dua filo de samuraj-kampano kiu estis la plej malalta samuraja klaso en la feŭdo de Tosa (la nuna gubernio Kōti).

Post ekzercado de skermarto kaj kanonarto en Edo (nuna Tokio), li revenis al la hejmloko Tosa kaj aliĝis al rojalisma partio.

Li forlasis la feŭdon en 1862 kaj fariĝis disĉiplo de KATU Kaisyū kiu estis vasalo de la ŝoguno



SAKAMOTO Ryōma

de Tokugawa, kaj li havis internacian senson kaj novan ideon pri la fondo de la moderna ŝtato.

Li envenis en Nagasakon en 1864, kaj fondis en 1865 “Kameyama-Syatyû”, kiu estis la unua komerca kompanio,



Vestiĝo de Kameyama-Syatyû

ricevinte subtenon de la daimio de Satuma kaj de la familio Kozone (小曾根) kiu estis riĉa komercisto en Nagasako. Li apogis renversmovadon de ŝoguna registaro fare de la daimioj de

Satuma kaj Tyôsyû per aĉeto de militoŝipoj aŭ pafiloj kaj fine atingis la redonon de la regpotenco.

La vestiĝo de la “Kameyama-Syatyû” estis restaŭrita en 2009 kaj estas malfermata kiel la “monumenta domo de la Kameyama-Syatyû”.

Plue, estas fonditaj en la urbo kelkaj aliaj monumentaj domoj kiel “Administrejo de Nagasako, Ryôma-denkan”, “Matinaka Ryôma-kan” k.a.

Unu vojo, 2.7 kilometrojn longa tra kelkaj lokoj ligitaj al Ryôma, estis nomita “La vojo de Ryôma en Nagasako” kaj ĝi estas amata de loĝantoj kaj turistoj kiel promenejo. (NAKAO Satoshi)

(要約) 幕末の志士、坂本龍馬 (1835 ~ 1867) は長崎にも縁が深く、彼が設立した日本最初の商社「亀山社中」をはじめとする数多くの遺跡は、観光ルートとして整備され、親しまれている。 (中尾 憲)

## La plej antaŭa fronto de Japanio por internacia interfluo

Nagasako situas proksime de Ĉinio kaj Koreio, kaj tial en pasinteco homoj, kiuj volis iri al ambaŭ landoj, unue trapasis Nagasakon. Kenzui-ŝi (Misio al Sui-Dinastio, Ĉinio) kaj Kentô-ŝi (Misio al Tang-Dinastio, Ĉinio) iris al Ĉinio tra la Insuloj de Gotô (okcidenta insularo, ĉefe el kvin insuloj). Kaj la korea kulturo eniris tra la Insuloj de Tusima (norda insularo).

En Nagasako oni faris internacian

komercon kun Ĉinio de antaŭe. La kulturo de Ĉinio venis en Nagasakon kaj do en Nagasako troviĝas ĉinaj domoj.

La unua kristanisma misiisto estis Francisco DE XAVIER, portugalo, kiu kun aliaj venis al Japanio en 1549.

La portugaloj ege



Francisco DE XAVIER

propagandis kristanisman, kaj komence la regantoj akceptis tion, sed en 1612 la registaro de Edo (nuna Tokio) deklaris malpermeson de kristanismo kaj decidis ekzili ĉiujn misiistojn. Male, nederlandanoj, kiuj venis al Japanio pli poste ol portugaloj, ne propagandis sian religion kaj havis intereson nur pri internacia komerco. Tial estis permesate al ili veni al Japanio.

El kvin velŝipoj, kiuj ekiris de Nederlando la 27-an de julio 1598, nur unu velŝipo “De Liefde” povis alveni al la haveno de Usuki (en la nuna gubernio Ooita) la 19-an de aprilo 1600. Tio estis la unua renkontiĝo de nederlandanoj kun japanoj. En 1602 Nederlando establis VOC (la Unuiĝinta Orientinda Kompanio) kaj en 1609 estigis sian oficejon en la urbo Hirado en la gubernio Nagasako. En 1639 la registaro de Edo permesis, ke nur nederlandanoj kaj ĉinoj faru internacian komercon kun japanoj. Kaj en 1641 nederlandaj komercistoj estis translokitaj al Dezima, artefarita malgranda insulo en Nagasako, kaj en ĝi loĝis nederlandanoj kaj japanaj oficistoj, kiuj kontrolis ilin. Pro ĉi tiu fakto Japanio havis meriton “gajni freŝdatajn informojn pri Eŭropo”, kaj Nederlando havis meriton “havi grandan profiton aĉetante arĝenton kaj argilaĵojn”. En tiu tempo Japanio produktis trionon da arĝento en la tuta mondo.

La oficejoj de la ŝipo “De Liefde” estis bonvenigitaj de la registaro de Edo. William ADAMS, kiu informis al la reganto TOKUGAWA Ieyasu pri inter-

naciaj aferoj en Eŭropo, estis grave dungita.

En Dezima en Nagasako nederlandanoj faris internacian komercadon dum 218 jaroj (1641 ~ 1859) kaj pli ol 700 nederlandaj ŝipoj venis al tiu insuleto. Dezima ludis esencan rolon kiel la malfermita sola fenestro de Japanio al la Okcidento, tra kiu novaj scioj kaj kulturoj eniris en Japanion.

Popoloj en Nagasako nomis eŭropanojn, eĉ ne nederlandanojn “Orandasano” (s-ro/s-ino Nederlando).

Ĉar nederlandanoj alportadis multajn eŭropajn aĵojn al Japanio dum multaj jaroj, ne malmultaj nederlandaj vortoj eniris en la japanan lingvon. Mi skribas tiujn vortojn japane (en latinaj literoj), nederlande kaj Esperante.

BURIKI (blik, lado)

PENKI (pek, farbo)

INKI (inko, inko)

RAKETTO (raket, rakedo)

KONPASU (kompas, kompasoj)

PONPU (pomp, pumpilo)

RENU (lens, lenso)

RETTERU (letter, etiketo)

YOTTO (jacht, jakto)

BISUKETTO (beschuit, biskvito)

HAMU (ham, ŝinko)

TYOKOREETO (chocolade, ĉokolado)

KOOHI (koffie, kafo)

BIIRU (bier, biero)

Ankaŭ eŭropa medicino estis alportita al Japanio de nederlandanoj. Fama



William ADAMS

japana kuracisto SUGITA Genpaku (1733~1817) tradukis nederlandan medicinan libron *Ontleedkundige Tafelen* en la japanan kun la titolo de *Kaitai-sin-syo* en 1774, kies fonto estis *Anatomische Tabellen* en la germana.

Germana kuracisto Philipp Franz VON SIEBOLD estas bone konata en Japanio. Li venis al Dezima kiel kuracisto en 1823. Dum sia restado li esploris multe pri Japanio, kaj reveninte hejmen, li verkis serion de 7 dikaj libroj *NIPPON* (Japanio) pri tiamaj diversaj aferoj pri Japanio kaj aliajn librojn pri japanaj animaloj kaj plantoj. Li eĉ nomis novspecion de hidrangeo “Hydrangea Otakusa”, ĉar karesnomo de lia japana edzino estis Otakisan (oficiala nomo estis KUSUMOTO Taki)

En la epoko Edo multaj gubernioj (nomata ‘han’) sendis eminentulojn al Nagasako por gajni novajn informojn pri la mondo. (MORIWAKI Yasumasa)

(要約) 長崎は、遣隋使、遣唐使の昔から大陸との交流があり、鎖国中は海外との唯一の窓口となり、国際交流が盛んだった。今でも異国情緒豊かな町である。

(盛脇保昌)


## Nagasako kaj Atombombo

Je 11:02 antaŭtagmeze de la 9-a de la aŭgusto en 1945, la lasta jaro de la Dua Mondmilito, la usona aerarmeo faligis unu atombombon al la urbo Nagasako. Tiu bombo mortigis ĉirkaŭ 74 000 da

urbanoj (tiamaj loĝantoj en la urbo Nagasako estis 240 000). Ĉirkaŭ 36% da konstruaĵoj estis defaligitaj komplete aŭ parte. Siatempe oni antaŭvidis, ke herbaĵoj ne kreskos dum 75 jaroj.

La atombombo al Nagasako estis el plutonio 239. Estis dirite, ke la potenco de la atombombo al Nagasako “Fat Man” estas 1.5-oble pli forta ol tiu al Hiroŝimo: “Little Boy”.

Divers-specaj aĵoj estas ekspoziciataj en la Atombomba Muzeo de Nagasako. Dokumentoj, fotoj kaj komentariaj paneloj estas ekspoziciataj laŭ la temoj de “la 9-a de aŭgusto 1945”, “realaj faktoj de damaĝoj pro la atombombo” kaj “por la mondo sen nuklea armilo”. Estas ekspoziciataj en la muzeo, “parto de disfalinta konstruaĵo, translokita”, “la horloĝo kies montriloj haltis je 11:02” kaj aliaj. Oni povas tuŝi ankaŭ kelkajn inter la multaj eksponaĵoj. Ili esprimas silente la suferon kaj mizeron pro la atombombo.



La Pac-parko estas ĉe la centro de la eksplodo kaj la najbara altaĵo. Oni povas eniri senpage. Sur tiu altaĵo staras granda statuo nomata “Statuo en preĝo de paco”, farita de KITAMURA Seibō (北村

西望). La statuo simbolas “Amon de Dio kaj korfavoron de Budho”. La dekstra mano kiu estas levita alten signifas minacon de atombombo kaj maldekstra mano, kiu estas etendita horizontale, signifas pacon. La iomete fermitaj okuloj signifas preĝon por la ripozo de animoj de la viktimoj de la atombombo. Antaŭ la granda statuo situas la placo kie ĉiujare okazas la memorig-konsola ceremonio por la animoj de atombombaj viktimoj en la 9-a de aŭgusto, la tago de la atombombo en Nagasako. Ĉirkaŭ la altaĵo troviĝas 15 monumentoj (simbolo por paco) kiuj estas dediĉitaj de diversaj landoj en la mondo.

(FUKAHORI Yoshifumi)

(要約) 原爆落下中心地一帯が平和公園になっている。原爆資料館，北村西望作の平和記念像がある。 (深堀義文)

## “La Sonorilo de Nagasaki”

En la 97-a Japana Kongreso en Nagasako oni kantos la kanton “La Sonorilo de Nagasaki”, esperantigitan de KONISI Gaku. Temas pri NAGAI Takasi (1908~1951), unu el atombombitoj en Nagasako. Nagai studis medicinon en Medicina Kolegio de Nagasako. Li estis baptita pro la influo de la fianĉino. Antaŭ la eksplodo de la atombombo li estis studanta radioterapion, kaj suferis pro leŭkemio.

La 9an de aŭgusto 1945 atombomba atako okazis en Nagasako. Tiam li estis en kliniko de la medicina kolegio, 700 metrojn de la eksplodcentro. Kvankam li estis terure vundita, li pene kuracis

atombombitojn. Kelkajn tagojn post longa kuracado, reirinte hejmen li trovis nur ostojn de la edzino en kuirejo.

Poste li organizis savogrupon kaj klopodis flegi atombombitojn. Li vivis kun du infanoj, kiuj ne estis atombombitaj, ĉar ili evakuis al fora parenco. Ofte suferante pro la simptomo de atommalsano li vivis en malfacilo, sed faris raporton pri kuracado de la atommalsano. Li mortis en 1951.

La kanto “La Sonorilo de Nagasaki” estis versita de SATŌ Hatirō kaj komponita de KOSEKI Yūzi. Nagai mem verkis la samtitolan eseon en 1949, kaj iom poste en la sama jaro oni ekvendis diskon de la kanto. La libro kaj la kanto estis furoraj siatempe, kaj oni faris ankaŭ filmon. La sonorilo estas tiu en la katedralo de Urugami, proksime de la eksploda centro. En la ruino de la katedralo oni trovis nur tiun sonorilon.

Ĉu ankaŭ vi kantos la kanton en la kongreso? (DOI Ĉieko)

(要約) 今回の日本エスぺラント大会では『長崎の鐘』が歌われる予定。自ら被爆しながら、救援活動に尽くした永井隆の著書『長崎の鐘』と同名の歌である。

(土居智江子)

## Esperanto-movado en Nagasako

En 1902 Alphonse MISTLER, (franco) priskribis enkodekan artikolon pri Esperanto en *Nagasaki press*, angla-lingva ĵurnalo. Tio estis la unua prezento de Esperanto en Japanio. Misler vizitis

Japanion en 1893 kaj li havis okupon en liceo nomata “Kaisei”. Li havis Esperantan kurson por 60 lernantoj de sia lernejo en 1896.

Nagasaki-Esperanto-Klubo (NEK) estis fondita en 1922. Oni fondis ankaŭ Medicinan Esperanto-Societon. Sasebo-Esperanto-Societo estis fondita en 1923. Oni festis la unuan Zamehofan feston en 1924 en Nagasako.

Esperanta Movado fariĝis aktiva, ĉar oni enkondukis Esperanton en Universitaton de Nagasako en frua periodo de 1930-aj jaroj. En la jaro 1934 la 22-a Japana Esperanto-Kongreso havis lokon en la urbo Nagasako, sub la gvido de TAKAHARA Ken. En 1926 la organo *Verda hejmo* estis eldonita en Nagasako. Estas la foto en kiu TAKADA Kôzi gvidis la kurson de Esperanto en radio-elsendo de NHK.

Dum ĉirkaŭ 10 jaroj post la Dua Mondmilito la movado estis tute silenta en Nagasako. La 19-an de januaro en 1956, unua Esperanta kunveno postmilita okazis en la hospitalo de TAKAHARA Ken. 8 esperantistoj kunvenis. Tio estis reviviĝo de NEK. Kaj ili decidis kunveni en ĉiu dua merkredo en la hospitalo. Estro estis TAKAHARA Ken. Efektivan movadon respondecis HUKAHORI Yoshifumi kaj KACUTA Kihei.

La 50-a UK okazis en Tokio en 1965. Unu usonano, kiu partoprenis la kongreson, vizitis Nagasakon. (Ni aŭdis, ke li estas la prezidanto de Esperanto-USA). Li vizitis kelkajn vidindaĵojn. Hukahori interpretis lian impreson pri la vizito al

Ĝardeno de Glover je televida elsendo TV-NBC. En oktobro de la jaro Hukahori gvidis elementan kurson en YMCA kun la enkonduko de TAKAHARA Ken.

La Kongresoj de Esperantistoj en Kjuŝu, okazis 10 fojojn en Nagasako: en 1926, 1934, 1961, 1972, 1978, 1985, 1990, 1995, 2001 kaj 2007.

La 59-a Kjuŝua Kongreso okazis en Nagasako en 1985. Tiam la broŝuro *Esperanto en Nagasako (la unua parto)* redaktita de IDEO Motoharu estis donita al la partoprenantoj kiel kongresa memoraĵo. HUKAHORI Yoshifumi fariĝis la prezidanto de NEK en la jaro.

Kiel la organo de NEK *Verda Haveno* (n-ro 1) estis eldonita en 1985. Tamen la organo ĉesis je n-ro 17 en 2001, kaj daŭras interrompo.

La 25-an de majo en 1990, en la kolumno nomata “Mizu ya Sora” [signifas {Akvo kaj Ĉielo}] de la ĵurnalo *Nagasaki Sinbun* oni skribis pri Esperanto kaj pri NEK, responde al la detala dokumento, de la 66-a Kongreso de Esperantistoj en Kjuŝu, sendita de Hukahori. La broŝureto *Intersteno* (『速記』 redaktita de Hukahori) estis donita al la partoprenantoj kiel kongresa memoraĵo.

La 4-an de aprilo en 2003 MORIWAKI Yasumasa, membro de NEK iris al la Biblioteko de la gubernio Nagasako por serĉi la ĵurnalon *The Nagasaki Press* en 1902, kaj trovis la artikolon, pri kiu Mistler raportis.

En la kutima kusido de februaro 2009 INUMARU Fumio sidis kun membroj de

NEK. Li klarigis kun la dokumento, ke Nagasako estas la plej proponata urbo por la venontjara (2010) Japana Esperanto-kongreso. (FUKAHORI Yoshifumi)

(要約) 長崎におけるエスペラント運動の紹介。今から 108 年前の 1902 年, アルフォンス ミスレルが長崎プレス (英字新聞) にエスペラントの紹介記事を書いた。今回は, 長崎での 2 回目の日本エスペラント大会である。 (深堀義文)

## Pri la 97-a Japana Esperanto-Kongreso

### Pri prelego

En la kongreso YAMASAKI Yoshihiko, kiu estas la ĉefadministranto de la kolegio “Kaisei Gakuen”, prelegos. La kolegio “Kaisei Gakuen” estas la loko, kie laboris Alphonse MISTLER, kiu enkondukis Esperanton en Japanion. La preleganto parolos pri la kolegio “Kaisei Gakuen” kaj la tempo, kiam Mistler laboris tie. Vi povos aŭskulti interesan parolon pri la cirkonstancoj, kiam Esperanto venis al Japanio.

(MORIWAKI Yasumasa)

(要約) 今回の日本大会では, アルフォンス ミスレルが活動していた海星学園の理事長 山崎善彦氏の講演があります。

(盛脇保昌)

### Kongresa memoraĵo

**Silento de ENDÔ Syûsaku**  
(ENDÔ Ŝuusaku)

Temas pri kristanismo en Japanio, kiam ĝi estis malpermesita en la 17a jar-

cento. Du portugalaĵ pastroj venis al Japanio por havi kontakton kun japanaj kristanoj kaj por esplori aferojn pri Pastro Ferreira, kiu perdiĝis en Japanio. Post malfacila ŝipveturado ili venis al Japanio kaj loĝis, sin kaŝinte sub zorgado de japanaj kristanoj...

Ĉi tie mi ne skribas detale pri la enhavo de la libro. Ĝi estas romano fikcia sed verkita laŭ realaj okazintaĵoj. Ĝi estis eldonita en 1966, kaj havis grandan reputacion. Aŭtentikaj kristanoj kritikis la libron kaj la verkiston, ĉar en ĝi la verkisto pritraktas konvertiĝon, kvankam li mem estis kristano.

Kiel s-ro Moriwaki skribas sur p.23-24 de ĉi tiu gazeto, Francisco DE XAVIER venis al Japanio kiel misiisto en 1549. Komence regantoj en Japanio estis tre favoraj al kristanismo, sed poste klariĝis malsameco inter pensoj de japanaj regantoj kaj kristanaj instruoj. En 1597 oni arestis 26 japanajn kristanojn, kiujn oni ekzekutis en Nagasako. Nun estas monumento por ili en la urbo.

En 1612 kristanismo estis malpermesita oficiale kaj de tiam okazis subpremoj, torturoj severaj kaj ekzekutoj. Vere, la tempo estis malfacila por kristanoj en Japanio. “Kial Dio silentas, dum kredantoj tiel suferas?” Tio estas la temo.

La libro estas tradukita en pli ol 13 lingvojn. Mi nun esperantigas ĝin.

(DOI Ĉieko)

(要約) 今年の日本大会の記念品は『沈黙』(遠藤周作著)のエスペラント訳。キリスト教が禁止されていた時代に日本にきた宣教師たち... (土居智江子)